

Bô Yin Râ

FAJREROJ
(Germanaj mantroj)

**PRAKTIKA UZADO DE
MANTROJ**

KOBER'SCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG
ZÜRICH

Kvara eldono de „Funken“ (la unua eldono aperis en 1924)
Dua eldono de „Mantra-Praxis“ (la unua eldono aperis en 1928)

La esperantigon de ambaŭ supre menciitaj tekstoj el la germana
kaj la transskribon de la mantroj per signoj de „International Phonetic
Alphabet“ (IPA) (Internacia Fonetika Alfabeto)
faris Alfred Rehfeldt (www.a-rehfeldt.de)

Transskribo en Internacia
Fonetika Alfabeto (IPA)
(vidu liston de signoj sur p.25)

Laŭvorta Esperanta traduko (kiu
redonu nur la sencon, ne la man-
tran kvaliton de la germana teksto)

I.

Um-mich-herum
Dring' in mich ein!
Ich:
Bin Dein *Schrein!*
Du:
Mein! –

um miç he'rum
driŋ in miç ain
iç
bɪn dain ʃrain
du:
main

Ĉirkaŭe-de-mi,
Penetru en min!
Mi:
Estas via *ujo!*
Vi:
Mia! –

II.

Wall von Kristall
Allüberall!
Schließe Dich
Rings um mich
Schließe ein
Mich im Sein! –
Überwölbe mich!
Überforme mich!
Lass nichts herein
Als *Licht* allein!

val fɔn kris'tal
'al|y:bə'|al
'ʃli:sə diç
riŋs um miç
'ʃli:sə ain
miç im zain
y:bə'vœlbə miç
y:bə'fɔrmə miç
las niçts he'rain
als liçt a'lain

Remparo el kristalo
ĉie kaj ĉie!
Fermu vin
Ĉirkaŭ min,
Enfermu
min en la esto! –
Supervolbu min!
Superformu min!
Enlasu nenion
krom sole *lumo!*

III.

Ich warte, –	ıç 'wartə	Mi atendas, –
<i>Ich!</i> – –	ıç	<i>Mi!</i> – –
Dunkles Tor!	'dun̩kləs to:tə	Malluma pordego!
<i>Ich!</i> – – –	ıç	<i>Mi!</i> – – –
Spring' auf!	ʃprɪŋ <u>auf</u>	Ekmalfermiĝu!!
– – – <i>Ich,</i>	ıç	– – – <i>Mi,</i>
Dahinter . . .	da'hɪntə	Post ĝi . . .
Ich,	ıç	Mi,
Davor	da'fo:ɣ	Antaŭ ĝi

IV.

Zacken-Berg	'tsakŋ-'bɛrk	Pinto-monto
Über mir . . .	'y:bə mi:tɣ	<i>Super</i> mi . . .
Drachen-Tiefe	'draxŋ-'ti:fə	Drako-profundo
Unter mir . . .	'untə mi:tɣ	<i>Sub</i> mi . . .
<i>Ich,</i>	ıç	<i>Mi,</i>
Auf dem «Weg»,	<u>auf</u> de:m ve:k	sur la „vojo“,
Bin selbst	bɪn zɛlpst	estas <i>mem</i>
Der <i>Steg!</i> – – –	de:ɣ ʃte:k	la <i>ponteto!</i>

V.

Feuer	¹ fɔyɐ	Fajro
In <i>mir</i> . . .	in mi:ɐ	En <i>mi</i> . . .
Feuer im <i>All</i> . . .	¹ fɔyɐ im al	Fajro en la <i>kosmo</i> . . .
Feuer	¹ fɔyɐ	Fajro
Im Feuer . . .	im ¹ fɔyɐ	En fajro . . .
<i>Ich selbst</i> , –	iç zelpst	<i>Mi mem</i> , –
<i>Ich!!</i>	iç	<i>Mi!!</i>
-----		-----
<i>Feuer!</i>	¹ fɔyɐ	<i>Fajro!</i>

VI.

Geist-Schweben,	gaist ¹ ʃve:bŋ	Spirito-ŝvebado
oben –	¹ o:bŋ	supre –
Geist-Weben,	gaist ¹ ve:bŋ	Spirit-efikado
unten –	¹ untŋ	sube –
Geist-Leben,	gaist ¹ le:bŋ	Spirito-vivado
mitten. ---	¹ mitŋ	meze. ---
Allerinnerst,	¹ alɐ ¹ mɛst	Plej interna,
außen –	¹ ausŋ	ekstere –
Allgebreitet,	¹ algə ¹ braitət	Êien etendita,
innen –	¹ mən	interne –
--- <i>Ich</i>	iç	--- <i>Mi</i>
darinnen! –	da ¹ rɪnən	en ĝi! –

VII.

O – wo?!	o: vo:	O – kie?!
O – wann?!	o: van	O – kiam?!
: O – <i>hier</i> !!	o: hi:ɣ	: O – <i>tie</i> <i>çi</i> !!
: O – <i>heute</i> !!	o: 'hɔytə	: O – <i>hodiaŭ</i> !!
-----		-----
Ich weiß jetzt:	ɪç vais <u>jetst</u>	Mi scias nun:
Ich <i>kann</i> ! --	ɪç kan	Mi <i>povas</i> ! --

VIII.

Ich <i>bin</i> !	ɪç bɪn	Mi <i>estas</i> !
Ich <i>lebe</i> !	ɪç 'le:bə	Mi <i>vivas</i> !
<i>Ich</i> : drinnen, –	ɪç 'drɪnən	<i>Mi</i> : interne, –
<i>Ich</i> : draußen, –	ɪç 'drausn	<i>Mi</i> : ekstere, –
<i>Ich</i> : Einer, –	ɪç 'ainə	<i>Mi</i> : unu, –
<i>Ich</i> : Alle! ---	ɪç 'alə	<i>Mi</i> : <i>çiuj</i> ! ---
-----		-----
Ich -- bin! –	ɪç bɪn	Mi -- estas! –

IX.

<p>I. A. O. : Linie : Zirkel . . . : Kreis! – Ewige Wanderung des <i>Punktes!</i></p> <hr style="border-top: 1px dashed black;"/> <p>I: spaltet! A: breitet! O: rundet! Eines in Allem: (⊕–) I. A. O.</p>	<p>i: a: o: 'li:niə 'tsirkl̩ krais 'e:wigə 'vandərʊŋ dəs 'pʊŋktəs</p>	<p>I. A. O. : linio : cirkelo . . . : cirklo! – Eterna migrado de la <i>punkto!</i></p> <hr style="border-top: 1px dashed black;"/> <p>I: fendas! A: etendas! O: rondigas! Unu en ĉio: (⊕–) I. A. O.</p>
---	--	--

X.

<p>Drei-bündig Band Bindet Beides: Eines in Allem: «Welt», – Alles im Einen: «Mensch»! – <i>Ich:</i> «Mensch» bin <i>Ich:</i> «Welt». – –</p>	<p>'draibʏndiç bant 'bɪndət 'baidəs 'ainəs in 'aləm velt 'aləs im 'ainən menʃ iç menʃ bɪn iç velt</p>	<p>Tri-benda rubando Ligas ambaŭ: Unu en ĉio: „Mondo“, – Ĉio en unu: „Homo“! – <i>Mi:</i> „homo“ estas <i>Mi:</i> „mondo“. – –</p>
---	---	--

XI.

<i>Un-gründig:</i>	¹ ʊngryndiç	<i>Sen-funda:</i>
<i>Urgrund, –</i>	¹ u:ğgrunt	<i>Prafundo, –</i>
<i>Ur-gründig:</i>	¹ u:ğgryndiç	<i>Pra-funda:</i>
<i>Eingrund, –</i>	¹ aingrunt	<i>Unufundo, –</i>
<i>Ein-gründig:</i>	¹ aingryndiç	<i>Unu-funda:</i>
<i>Allgrund, –</i>	¹ algrunt	<i>Ĉiofundo, –</i>
<i>All-gründig:</i>	¹ algryndiç	<i>Ĉio-funda:</i>
<i>Ich – bin! – – –</i>	iç bin	<i>Mi – estas! – – –</i>

XII.

<i>Nicht mehr, –</i>	niçt me:ğ	<i>Ne plu, –</i>
<i>Noch nicht. – –</i>	nox niçt	<i>Ankoraŭ ne. – –</i>
<i>Was dazwischen</i>	vas da ¹ tsviŝn	<i>Kio inter ili</i>
<i>Ist,</i>	ist	<i>Estas,</i>
<i>Bin – – Ich!</i>	bin iç	<i>Estas – – Mi!</i>

XIII.

Ich, <i>verloren</i>	ɪç fɛɣ'lo:rən	Mi, <i>perdita</i>
Im <i>Gefundenen</i> ,	im gə'fundənən	En <i>tio trovita</i> ,
Ich, <i>gefunden</i>	ɪç gə'fundŋ	Mi, <i>trovita</i>
Im <i>Verlorenen</i> ,	im fɛɣ'lo:rənən	En <i>tio perdita</i> ,
Liebe <i>Beides</i>	'li:bə 'baidəs	<i>Amas ambaŭ</i>
In <i>Einem</i> , --	in 'ainəm	En <i>unu</i> , --
<i>Erkenne:</i>	ɛɣ'kenə	<i>Ekkonas:</i>
Dieses bin <i>Ich!</i> ---	'di:zəs bɪn ɪç	<i>Tio ĉi estas Mi!</i> ---

XIV.

« <i>Verstehend</i> » nicht,	fɛɣ'ʃte:ənt niçt	Ne « <i>komprenante</i> »,
nicht « <i>erkennend</i> », –	niçt ɛɣ'kenənt	ne « <i>ekkonante</i> », –
<i>Will</i> ich.	vɪl ɪç	Mi <i>volas</i> ,
Und fühle:	unt 'fy:lə	Kaj <i>sentas:</i>
Mich selbst. ---	miç zɛlpst	Min <i>mem.</i> ---
<i>Fühlend</i>	'fy:lənt	<i>Sentante</i>
bin ich	bɪn ɪç	mi <i>estas</i>
<i>Nicht-wissend</i> ,	'niçtviŋt	<i>Ne-scianta</i> ,
Allwissender Weisheit	'al'viŋdə 'vaishait	<i>Scio de ĉioscianta</i>
Wissen:	'viŋ	<i>saĝo:</i>
« <i>Tat tvam asi!</i> »! ---		« <i>Tat tvam asi!</i> »! ---

XV.

Dieses ist den «Vätern» entschleiert!	'di:zəs ɪst de:n 'fɛ:tən ɛnt'ʃlaɪɐ̯t	Tio ĉi estas sensual- igita al la „patroj“!
Dieses und nichts anderes!	'di:zəs unt niçts 'andərəs	Tio ĉi kaj nenio alia!
Dieses will ich erfahren!	'di:zəs vɪl ɪç ɛ̯'fa:rən	Tion ĉi mi volas ekscii!
Dieses und nichts anderes!	'di:zəs unt niçts 'andərəs	Tion ĉi kaj nenion alian!
: Welches ist der «Name»	'vɛlçəs ɪst de:ɤ̯ 'na:mə	: Kiu estas la « <i>nome</i> »
Des <i>Menschen</i> ,	dəs 'mɛnʃən	De la <i>homo</i> ,
Der – ich – bin? – –	de:ɤ̯ ɪç bɪn	Kiu – mi – estas? –

XVI.

Ewig,	'e:viç	Eterna,
Das <i>Eine</i> , –	das 'ainə	Tio <i>unu</i> , –
Ewig,	'e:viç	Eterna,
Das <i>Andere!</i> –	das 'andərə	Tio <i>alia!</i> –
Ewig,	'e:viç	Eterna,
Das aus <i>Beiden</i>	das aus 'baidən	Tio el <i>ambaŭ</i>
<i>Seiende!</i>	'zaiəndə	<i>Estanta!</i>
Keine «Einheit»,	'kainə 'ainhait	Neniu «unueco»,
Kein «Leben»,	kain 'le:bŋ	Neniu «vivo»
Ohne diese <i>Drei!</i>	'o:nə 'di:zə drai	Sen tiuj <i>ĉi tri!</i>
<i>Fühlend</i>	'fy:lənt	<i>Sentante</i>
Erfasse ich	ɛɣ'fasə iç	Mi ekkaptas
Solches in mir . . .	zəlçəs in mi:ɣ	Tion en mi . . .
Zu <i>mir</i>	tsu: mi:ɣ	Al mi
Mich wendend,	miç 'vəndənt	Min turnante,
Rufe ich	'ru:fə iç	Mi vokas
Mich selbst,	miç zelpst	Min mem,
Und rufe:	unt 'ru:fə	Kaj vokas:
« <i>Ich</i> »!! –	iç	« <i>Mi</i> »!!
Nach außen	na:x 'ausŋ	Eksteren
Rufe ich	'ru:fə iç	Mi vokas
Mich selbst,	miç zelpst	Min mem,
und rufe:	unt 'ru:fə	Kaj vokas:
« <i>AUM</i> »! – – –		« <i>AUM</i> »! – – –

XVII.

Alles ist <i>Stufe!</i> – –	'aləs ɪst 'ʃtu:fə	Ĉio estas ŝtupo!
Über mich <i>selbst</i>	'y:bə miç zelpst	Super min <i>mem</i>
Schreite ich,	'ʃraitə ɪç	Mi paŝas,
Und werde <i>mir selber:</i>	unt've:ɣdə mi:ɣ 'zɛlbə	Kaj fariĝas <i>al mi</i>
<i>Stufe!</i> . . .	'ʃtu:fə	<i>mem:</i> ŝtupo! . . .
So finde ich:	zo: 'fində ɪç	Tiel mi trovas:
<i>Meine</i>	'mainə	Mian
<i>Unendlichkeit,</i>	ʊn' ɛntliçkait	<i>senfinecon,</i>
Indem ich ewig	in'de:m ɪç 'e:viç	Eterne ascendante
Eine neue Stufe steige	ainə 'noyə 'ʃtu:fə 'ʃtaigə	novan ŝtupon,
Und ewig bin – <i>ich</i>	unt 'e:viç bin – ɪç	Kaj eterne estas –
<i>selbst</i>	zelpst	<i>mi mem</i>
Die Stufe	di: 'ʃtu:fə	La ŝtupo

XVIII.

Loslösend	'lo:slø:zənt	Malligante
<i>Mich selbst</i>	mɪç zɛlpst	<i>Min mem</i>
Von <i>mir selber</i> ,	fən mi:ɣ zɛlbə	De <i>mi mem</i> ,
Finde ich:	'fində ɪç	Mi trovas:
<i>Mich selbst!</i> – – –	mɪç zɛlpst	<i>Min mem!</i> – – –
Im Unsichtbaren	ɪm 'ʊnzɪçtba:rən	En tio nevidebla
ausatmend:	'aus a:tmənt	elspirante:
<i>Mich selbst</i> ,	mɪç zɛlpst	<i>Min mem</i> ,
Verliere ich:	fɛɣ'li:rə ɪç	Mi perdas:
<i>Mich selbst</i>	mɪç zɛlpst	<i>Min mem</i>
Im Unsichtbaren . . .	ɪm 'ʊnzɪçtba:rən	En tio nevidebla . . .
Einatmend:	'ain a:tmənt	Enspirante:
<i>Mich selbst</i> ,	mɪç zɛlpst	<i>Min mem</i> ,
Fühle ich mich selbst:	'fy:lə ɪç mɪç zɛlpst	Mi sentas min mem
<i>Als Unsichtbares . .</i>	als 'ʊnzɪçtba:rəs	<i>Kiel ion nevideblan.</i>
Einsaugend:	'ainzaugənt	Ensuçante:
<i>Dieses Unsichtbare</i>	di:zəs 'ʊnzɪçtba:rə	<i>Tion çi nevideblan</i>
In mir selbst,	ɪn mi:ɣ zɛlpst	En mi mem,
<i>Dem Unsichtbaren</i> ,	de:m 'ʊnzɪçtba:rən	<i>La nevidebla</i> ,
Gewinne ich <i>mich</i>	gə'vɪnə ɪç mɪç	Mi gajnas <i>min</i>
<i>selbst</i>	zɛlpst	<i>mem</i>
<i>Als Unsichtbares</i>	als 'ʊnzɪçtba:rəs	<i>Kiel ion nevideblan</i>
Im <i>sichtbaren Leibe</i> . . .	ɪm 'zɪçtba:rən 'laɪbə	En <i>videbla korpo</i> . .
«Jîvâtâmâ»! – Om!		«Jîvâtâmâ»! – Om!

XIX.

Einstmals	<u>'</u> ainstma:ls	Iam
Lebte ich viele Leben –	'le:ptə iç 'fi:lə 'le:bŋ	Mi vivis multajn vivojn
Des Todes . . .	dəs 'to:dəs	De l' morto . . .
Einstmals	<u>'</u> ainstma:ls	Iam
Lebte ich, –	'le:ptə iç	Mi vivis, –
War tot . . .	va:ɤ to:t	Estis morta . . .
Nun ich «gestorben»,	nu:n iç gə'ʃtɔrbŋ	Nun «mortinta»,
Will ich <i>leben</i> . . .	vɪl iç 'le:bŋ	Mi volas <i>vivi</i> . . .
<i>Ich bin es, –</i>	iç bɪn ɛs	<i>Estas mi, –</i>
Der «gestorben» ist! –	de:ɤ gə'ʃtɔrbŋ ist	Kiu «mortis»! –
<i>Ich bin es, –</i>	iç bɪn ɛs	<i>Estas mi, –</i>
Will <i>leben!</i>	vɪl 'le:bŋ	Volas <i>vivi!</i>
Ewiges Leben, rinne	'e:vɪgəs 'le:bŋ rɪnə	Eterna vivo, fluu
Aus urtiefem Quell	aus 'u:ɤti:fəm kvɛl	El praprofunda fonto
In mir	ɪn mi:ɤ	En mi
<i>In mich selbst!</i>	ɪn miç zɛlpst	<i>En min mem!</i>
Rinne	'rɪnə	Fluu
<i>Durch Mark und Blut!</i>	dɔɤɤ mark unt blu:t	<i>Tra medolo kaj sango!</i>
Lass <i>Leben leuchten!</i>	las 'le:bŋ 'lɔyçtŋ	Igu <i>vivon lumi!</i>
Leuchten am dunklen	'lɔyçtŋ am dɔŋklən	Lumi en malluma
Ort!	ɔɾt	loko!
Lass wieder werden,	las 'vi:də 've:ɤdŋ	Igu, ke refariĝu tio,
Was Ursprungs war:	vas 'u:ɤʃprɔŋs va:ɤ	Kio origine estis:
<i>Mich selbst,</i>	miç zɛlpst	<i>Mi mem,</i>
<i>Der ich bin!!</i> – – –	de:ɤ iç bɪn	<i>kiu mi estas!!</i> – – –
«Aham brahma asmi»!		«Aham brahma asmi»!
Om!		Om!

XX.

Wegweisender Wille!	've:kvaizəndə 'vɪlə	Vojmontranta volo!
<i>Wolle in mir!</i>	'vələ in mi:ɣ	<i>Volu en mi!</i>
Wirke Werden!! –	'vɪrkə 've:ɣdən	Estigu <i>fariĝon!!</i> –
<i>O Über-Ich!</i>	o 'y:bə-ɪç	O Super-Mi!
<i>Über-zeuge mich!</i>	'y:bə-tsoygə miç	<i>Konvinku min!</i>
<i>Über-lichte mich!</i>	'y:bə-liçtə miç	<i>Super-lumigu min!</i>
Wirke Werden!	'vɪrkə 've:ɣdən	Estigu <i>fariĝon!</i>
Werde – – <i>Ich!!</i> – – –	've:ɣdə ɪç	Fariĝu – – <i>Mi!!</i> – – –

XXI.

<i>Brenne – Geist! – Brenne</i>	'brenə ɡaist 'brenə	<i>Brulu – spirito! – Brulu</i>
<i>Durch Haut und Gebein!</i>	durç haut unt gə'bain	<i>Tra haŭto kaj ostoj!</i>
<i>Lichte – Geist! – Lichte</i>	'liçtə ɡaist 'liçtə	<i>Lumu – spirito! – lumu</i>
<i>Den dunklen Schrein!</i>	de:n 'dun̩klən ʃrain	<i>La malluman ujon!</i>
<i>Glühe – Geist! – Glühe,</i>	'gly:ə ɡaist 'gly:ə	<i>Ardu – spirito! – ardu,</i>
<i>Durchglühe, den «Stein»!</i>	durç'gly:ə de:n ʃtain	<i>Traardu la «ŝtonon»!</i>

XXII.

<i>Drei</i> ist <i>Eines</i>	dra̯ i ist 'ainəs	<i>Tri</i> estas <i>Unu</i>
in <i>sich selber</i> , –	in zɪç 'zelbə	en <i>si mem</i> , –
Spendet:	'ʃpendət	(Ĝi) eligas:
<i>Vier</i> der «Lenker»,	fi:ɣ de:ɣ 'leŋkə	<i>Kvar</i> «kondukantojn»,
<i>Zehn</i> der «Gewalten»,	tse:n de:ɣ gə'valtŋ	<i>Dek</i> «potencojn»,
<i>Zwölf</i> der «Väter» . . .	tsvœlf de:ɣ 'fe:tə	<i>Dekdu</i> «patrojn» . . .
Daraus sprießend:	'da:raus 'ʃpri:sənt	El tio kreskas:
<i>Vielfältige Einheit</i> , –	'fi:lfeltigə 'ainhait	<i>Multspeca unueco</i> , –
Die «Meister» . . .	di: 'maistə	La «majstroj» . . .
<i>Ich</i> ,	ɪç	<i>Mi</i> ,
Der ich diese Worte lese,	de:ɣ ɪç 'di:ze 'vɔrtə	kiu legas tiujn ĉi vortojn,
	'le:zə	
Der ich sie höre,	de:ɣ ɪç zi: 'hø:rə	kiu ilin aŭdas,
Der ich sie kenne,	de:ɣ ɪç zi: 'kenə	kiu ilin konas,
Der ich sie weiß,	de:ɣ ɪç zi: vaɪs	kiu ilin scias,
<i>Ich</i> , – will «Schüler» sein	ɪç vɪl 'ʃy:lə zain	<i>Mi</i> – volas esti «disciplo»
All dieser Zahl!	al 'di:zə tsa:l	De ĉiu ĉi nombro!
<i>Ich</i> – <i>Einer</i>	ɪç 'ainə	<i>Mi</i> – <i>unu</i> ,
Vertraue,	fɛɣ'trauə	Fidas,
Baue,	'bauə	Konstruas,
Mit Lot, Winkel, Kreis	mit lo:t 'vɪŋkl̩ kraɪs	Per vertikalilo, angulo,
		cirklo,
Was ich nun weiß:	vas ɪç nu:n vaɪs	Kion mi nun scias:
<i>Mich selbst</i> auf dem	miç zelpst aʊf de:m	<i>Min mem</i> sur la
Grundriss:	'gruntris	plano:
«I. A. O.»	i: a: o:	«I. A. O.»

PRAKTIKA UZADO DE MANTROJ

Unu el la plej gravaj rimedoj por formi la animon estas la influo de certaj serioj da sonoj de la homa parolo.

Tiu ebleco de influado estas konata ekde *praa tempo*, kaj la spuro de tiu scio estas facile trovebla en la liturgioj kaj la pli popularaj preĝoj de ĉiuj grandaj religioj de la homaro.

Tiu scio estis gardata kiel sankta *sekreto* fare de iluminigintaj, *naskitaj* sacerdotoj, kiuj iam staris ĉe la lulilo de ĉiu antikva fruktodona formado de religio. Sed ĝi pli kaj pli forgesiĝis en la okcidenta mondo, aŭ estis pludonata nur en siaj *aplikoj*, dum ĝian *bazon* oni plejbonaokaze nur mallume suspektas.

La situacio estas malsama en Oriento, kie la saĝo de la antikvuloj grandparte certe ankaŭ kuŝas sub ruineroj, sed kie oni ankoraŭ tre bone *konas* la potencon influon de *interne parolataj vortoj*, uzante ilin ĉiutage kun bona aŭ malbona intenco.

Mi tie ĉi eksplicite emfazas la *interne* parolatan vorton, ĉar gravas nur la *interna* parolado, kvazaŭ parolado *en sin mem*, kaj oni ne lasu sin erarigi de la opinio de orientaj mantrospektuloj, kiuj kun certa ŝajno de rajtigiteco atribuas grandan valoron ankaŭ al la sono perceptebla *per la orelo*.

Kvankam tie ĉi ne temas pri „superstiĉo“, ĉar la *fizike perceptebla* sono vere ne estas sen intensa influo, oni devas plej precize distingi, ĉu oni volas atingi influon sur la *animon*, aŭ nur sur la centrojn de fluidecaj fortoj en la *fizika* organismo...

Orientano pleje strebas *samtempe* al ambaŭ, kaj ankaŭ kapablas direkti ambaŭ efikojn laŭ sia volo, rezulte de mem-

edukado praktikita ekde plej frua juneco, pere de kapablo kultivita dum jarcentoj, kaj per vivmaniero, kiu ne ĝenas lian intencon, sed konsiderinde subtenas ĝin. Kontraŭe, homo de la *okcidenta* mondo *ne* estas en same favora pozicio: se li provus utiligi samtempe la *fizike aŭdeblan* sonon, li riskus ne nur *endanĝerigi* la efikon sur sian *animon*, sed ankaŭ sperti gravan damaĝon en la fajnsubstanca parto de sia fizika korpo.

Okcidentano povas sendanĝere inkludi nur relative mildan formon de fizike aŭdeblaj sonoj en sian praktikadon de man-troj, formo, kiu troviĝas ekzemple en la recitado de litanioj kaj ĥoraj preĝoj, kaj certagrade ankaŭ en preĝejaj kantoj.

Sed tie, kie oni eksperimentas *sole* kun la fizike aŭdebla sono por laŭsupoze atingi pli altan internan ekkonon – indiferente ĉu oni faras tion en oriento aŭ okcidento –, oni nesuspektante fariĝas plej efika kunhelpanto de ĉiuj fortoj de la *nevidebla fizika mondo*, kiuj estas *malamikaj* al la homo (aŭ havas kvazaŭ „*venenan*“ efikon sur lin), kaj la elrevitaj ekkonoj, kiom ajn sublimaj ili eble ŝajnas, estas nenio alia ol memestigataj fantasmagorioj foraj de la realo.

La okcidentano, kiu volas servigi la efikon de la *internen* parolata vorto al la formado kaj memspertado de sia *animo*, iros vojon *ĉiuokaze* sekuran, se li *tute evitas* akompani la *internan* paroladon per samtempa *fizike aŭdebla* sono, kaj mi tute decide malkonsilas eĉ nur *mallaŭte murmuri* tiujn *internen* parolatajn vortojn, aŭ eĉ nur *movi la lipojn* dum tiu ĉi interna parolado! –

Bona mantro estas sentenco formita laŭ *okult-spiritaj* ekkonoj, en kies uzado gravas nur la sonfiko pure *spirita* kaj tute *neperceptebla* al la fizika orelo. –

La interna parolado estu farata tiel, ke ĝi fariĝu kvazaŭ „komunio“, *spirita enprenado*, aŭ ĝuado de la vortoj kiel *spirita nutraĵo*. – –

La malgranda serio da germanlingvaj mantroj, kiujn mi donis al la publiko sub la titolo „Fajreroj“, ne estu komprenata tiel, kvazaŭ mi konsilus enpreni ĉiutage *ĉiujn* mantrojn.

Krome, la vica ordo, en kiu ili estas prezentitaj, tute ne preskribas, ke ili estu *enprenataj en tiu sama ordo*.

Anstataŭe, oni elektu al si tiun specifan sentencon, kiu tiutempe impresas onin plej intense, kaj parolu ĝin en sian internon ĉiutage en kvietita horo, sen deklamado, sen emfazo, simple, senartifike, kaj *neaŭdeble por la fizika orelo*, sen speciale analizi ĝian „signifon“, sen cerbumi pri la senco.

Tio ne signifas, ke oni devas perforte *subpremi* la sencon, kiu prezentiĝas *per si mem!*

Sed oni ne *serĉu* la sencon, sed enprenu la vortojn en sin kiel *spiritan* sonformon. Poste ankaŭ la pense kaptebla signifo ĉiutage pli kaj pli malfermiĝos al oni sen cerbumado.

Sed kiam oni sentas eĉ nur mildan *laciĝon*, la parolado en sian internon devas esti tuj *ĉesigata*.

Krome, oni ŝanĝu la mantron, kiam ĝi ne plu havas efikon sur la sentadon.

Neniam devas prezentiĝi dum la interna parolado la plej eta *malagrabra sento*.

La tuta uzado de mantroj estas praktiko, kiu nur en feliĉa libereco kondukas al prosperigaj rezultoj.

Tie ĉi, ĉio perforta aŭ devigita estas malbona.

Oni devas paroli en sian internon plene malstreĉiĝinte, kaj kvazaŭ temus pri kutima ĉiutagaĵo!

Dum la praktikado, oni akceptu siajn sentojn tiaj, kiaj ili venas, sed oni *ne gvatu* sian vivon de sentado: – ne *atendu* eksterordinarajn novajn sentojn rezulte de la interna parolado!

Ju pli kviete, fideme kaj egalanime oni prenas la tutan aferon, des pli benoplena estos ĝia efiko.

Kio estas donita en la dudek du „Fajreroj“, tio ankaŭ ne estu rigardata kiel kvanto da taskoj, kiu estas „plenumenda“ ene de certa tempo!

Kontraŭe, la dudek du sentencoj sufiĉas por la tuta surtera vivo, eĉ se ĝi daŭras cent dudek jarojn...

(Ilia *efiko* eĉ etendiĝas *foren trans* la surteran vivon.)

Kiu eble parolis en sin mem ĉiujn mantrojn pli ol dekduon da fojoj, tiu tamen rimarkos, ke subite en certa horo li staras vidalvide al unu aŭ alia el tiuj mantroj, kvazaŭ li ankoraŭ neniam aŭdis ĝin, kaj, kiam li ĉiam denove atendas la ĝustan horon, nova forto kaj nova lumo alfluos al li el tiuj dudek du putotuboj de sanktaj saĝofontoj...

Povas okazi, ke homo en la aĝo de sesdek jaroj venas al anima sperto, pri kiu li antaŭe sciis nenion, kvankam li ekde sia dudeka jaro opiniis bone koni tiujn ĉi mantrojn, kaj dum la paso de la jaroj ŝuldis al ili pli ol unu alia anima sperto. – –

La *ekkono* ampleksata de la mantroj *ne* estas sondebla *en pensado*, sed ĝi doniĝos al tiu, kiu spirite parolas ilin en sin mem, pli aŭ malpli frue en *spirita* maniero, eĉ se la vortrilatoj prezentiĝas al li kvazaŭ „enigmoj“...

Krome, oni ne lasu sin malkvietigi per la malmultaj enmetitaj vortoj en sanskrito!

Ili probable estas konataj al la plimulto de la serĉantoj. Sed kiu sentas ilin fremdaj, tiu spirite parolu ilin internen tie, kie ili troviĝas, kaj iam ili montros sian efikon kaj per tio pruvos, ke ilia enmeto estis rajtigita.

„*Tat twam asi*“ signifas:

Tio estas vi!

„*Aum*“ ne nur signifas la saman kiel la hebrea formulo de konfirmo „*Amen*“, sed entenas, kiam ĝuste prononcata (la „*A*“ proksimiĝas al la prononco de „*O*“, kaj la „*U*“ sonas nur malforte), ankaŭ la sonvibroj, kiuj konformas al la

esto el si mem

kaj tial estas adorata en Hindujo ekde praa tempo kiel la plej sankta vorto.

(„*Om*“ estas skribmaniero redonanta la saman vorton sen sanskritliteroj. Mi uzis ĝin tie, kie gravis indiki la karakteron de la vorto kiel plej solenan *konfirmon*.)

„*Jivâtma*“ estas: la *individua dia vivo*, precipe *la dia spiritofajrero en la individua animo*.

„*Aham brahma asmi*“ signifas:

Jen mi mem estas pra-esto!

Ĉion ĉi oni ne bezonas scii por la uzado de la mantroj, kaj mi donas tiujn indikojn nur por aŭtentike konstati, en kiu senco mi mem certaloke enmetis tiujn pruntaĵojn el la hindo-ĝermana radiklingvo.

Hodiaŭ jam tre multaj homoj – ankaŭ iuj, por kiuj la lingvo de la mantroj *ne* estas la patrino lingvo – bone konas tiujn ĉi germanlingvajn mantrojn, spertis ilian benoplenan efikon kaj ĉiutage spertas ĝin denove.

Sed kelkfoje mi aŭdas pri serĉantoj, kiuj evidente ne scias, ĉu ili rigardu tion donitan sub la titolo „*Fajreroj*“ kiel ekspresionismajn poeziaĵojn aŭ kiel enigmojn por stimuli ilian pensadon. Ekzistas aliaj, kiuj jam aŭdis pri la efikoj sur la animo atingebaj per certaj serioj da sonoj kaj vortoj, sed nun

¹Om' estas nur alia skribformo de la vorto 'Aum' kaj tial estu prononcata ekzakte kiel tiu ĉi. (Rim.de la tradukinto)

² Prononcu: [dʒi.va:tma:] ('dʒ' ekvivalentas al la esperanta litero 'ĝ').(Rim.de la tradukinto)

timas – kaj eble prave –, ke ties esenca efiko povus esti malfortigata per malĝusta uzado de la mantroj.

Se ekzistas ankaŭ serĉantoj, kiuj eble timas, ke la malĝusta uzado de *tiuj ĉi* mantroj povus kaŭzi animan aŭ fizikan *damaĝon*, mi diras al ili, ke tie ĉi temas pri serioj da sonoj kaj vortoj, kiuj estis intence formataj tiel, ke eĉ ilia *misuzo* por sole *fizike aŭdebla sonado* povus alporti *nenian damaĝon*; sed tiaokaze mankus ankaŭ la anime benoplenaj efikoj.

Mi neniam estus povinta preni sur min la respondecon por la publikigo de tiuj ĉi mantroj, se ekzistus eĉ la plej malgranda danĝero en la okazo de tia misuzo.

Mi pensas, ke per tiuj klarigoj mi probable respondis ĉiun demandon, kiu eble povus rezulti al iu aŭ alia serĉanto el la unua kontemplado de la dudek du sentencoj, kiujn li tenas en siaj manoj kiel „Germanajn Mantrojn“.

La tradukado de tiuj ĉi mantroj en aliajn lingvojn longtempe ŝajnis al mi neebla, ĝis mi konvinkiĝis, ke la tradukado en la italan sukcesis. Mi do ne plu aŭdacas dubi, ke tiuj ĉi „fajreroj“ povas ekbruligi ankaŭ en aliaj lingvoj, se ili estas transmetataj en ĝustan formon.

Beno kaj anima memspertado, internaj feliĉo kaj paco plue alfluu abunde al ĉiuj, kiuj scias uzi tiun ĉi serion da mantroj en ĝusta maniero!

Listo de fonetikaj signoj*

Fonetika signo	Priskribo	Germana ekzemplo	Prononco	Analoga(j) Esp. litero(j)	Kiel en la Esp. vorto
a		hat	hat	a	al
a:	longa ,a ^ˈ	Bahn	ba:n	—	
ɐ	iom pli malhela ol ,ə ^ˈ	Ober	'o:bɐ	—	
ɘ	iom pli malhela ol ,e ^ˈ	Uhr	u:ɘ	—	
<u>ai</u>		weit	<u>vait</u>	aj	kajto
<u>au</u>		Haut	<u>haut</u>	aŭ	haŭto
b		Ball	bal	b	balo
ç	kiel en emfaze prononcita angla „huge“ [çu:dʒ]	ich	iç	—	
d		dann	dan	d	da
e	mallonga vasta ,e ^ˈ	Methan	me'ta:n	Variantaj prononcoj de 'e'	metano
e:	longa vasta ,e ^ˈ	ewig	'e:viç		
ɛ	mallonga malvasta ,e ^ˈ	Bett	bet		
ɛ:	longa malvasta ,e ^ˈ	Väter	'fe:tɛ		
ə	tre simila al la sono en la lasta silabo de angla ,china ^ˈ , aŭ brita angla ,over ^ˈ , paper ^ˈ	halte	'haltə	—	
f		Feuer	'fɔyɐ	f	fajro
g		Geist	gəist	g	grupo
h		hat	hat	h	havas
i	mallonga malvasta ,i ^ˈ	vital	vi'ta:l	i	ekonomio
i:	longa malvasta ,i ^ˈ	viel	fi:l	i	vivo
ɪ	mallonga vasta ,i ^ˈ	bist	bɪst	i	bitumo
j		ja	ja:	j	ja
k		kalt	kalt	k	kampo
l		Liebe	'li:bə	l	lerni
ʃ	,l ^ˈ prononcata kiel senvokala silabo	Zirkel	'tsɪrkʃ	—	
m		Mensch	menʃ	m	moro

*Laŭ la International Phonetic Alphabet (IPA) (Internacia Fonetika Alfabeto)

n		neu	nɔy	n	nova
ŋ	,n ^ˈ prononcata kiel senvokala silabo	baden	'ba:dŋ	—	
ŋ	naza <i>vela</i> konsonanto: ,ng ^ˈ kiel en angla ,sing ^ˈ	lang	laŋ	ekz-e en esp. ,longa ^ˈ , kiam ,n ^ˈ estas prononcata ne kiel naza <i>denta</i> konsonanto ['lɔŋga], sed (nekorekte) kiel naza <i>vela</i> konsonanto ['lɔŋga] por faciligi la elparolon.	
o	mallonga malvasta ,o ^ˈ	Moral	mo'ra:l	Variantaj prononcoj de ,o ^ˈ	
o:	longa malvasta ,o ^ˈ	Boot	bø:t		
ɔ	vasta ,o ^ˈ	Post	pøst		
ø	mallonga malvasta ,ø ^ˈ (la sono de ,eu ^ˈ en franca ,peu ^ˈ)	Ökonom	øko'no:m	—	
ø:	longa malvasta ,ø ^ˈ	Öl	ø:l	—	
œ	vasta ,ø ^ˈ (la sono de ,eu ^ˈ en franca ,neuf ^ˈ)	göttlich	'gœtliç	—	
ɔy		heute	'høytə	oj	ojstro
p		Pakt	pakt	p	papero
r		Rast	rast	r	ruĝa
s	senvoĉa ,s ^ˈ	Hast	hast	s	sola
ʃ		schön	ʃø:n	ŝ	ŝajni
t		Tal	ta:l	t	tio
ts		Zahl	t͡sa:l	c	celo
tʃ		Klatsch	klat͡ʃ	ĉ	ĉar
u	mallonga malvasta ,u ^ˈ	kulant	ku'lant	Variantaj prononcoj de ,u ^ˈ	
u:	longa malvasta ,u ^ˈ	Hut	hu:t		
ʊ	vasta ,u ^ˈ	Pult	pult		
v		was	'vas	v	vazo
x	kiel la sono de ,ch ^ˈ en la skota nomo ,Loch Ness ^ˈ	Bach	bax	ĥ	aĥ
y	kiel la sono de ,u ^ˈ en la franca vorto ,lune ^ˈ	Mykene	my'ke:nə	—	
y:	longa malvasta ,y ^ˈ	Rübe	'ry:bə	—	
ʏ	vasta ,y ^ˈ	Glück	glyk	—	

z	voĉa ,s'	sehen	'ze:ən	z	zumi
'	signifas, ke la sekvanta silabo estas akcentita	weiter	da'ri:nən		
	signifas, ke oni komencu la sekvantan vortparton per ,glota plozivo', farante tre mallongan paŭzon kaj kvazaŭ komencante novan vorton.	überall	y:bə' al		